

# AFRIKA REVUO

3-a Jaro (Nova Serio)

1947

Novembro-Decembro N° 11-12.

## NOVA SEZONO

Nova propagand-sezono komenciĝis. Estas certe necese rememorigi al la esperantistaro la neprecon de la propagando. Ni devas ja rekomenci kiel ĉiujare je tiu epoko plej efikan propagandon por Esperanto por atiri atenton de la vasta ne-esperantista publiko je Esperanto. Tion ni faras per la anoncado de okazontaj kursoj. Sed la kursoj solaj ne sufiĉas. Oni devas antaŭ ĉio fari publikajn propagandvesperojn, priparolantaj la neceson de Esperanto por la interrilatoj inter popoloj. Nur tiamaniere ni povos diskonigi la kursojn inter plej vastaj rondoj, ĉar de diskonigo dependas nia sukcesoj. Ni devas propagandi aparte en naciaj fak- kaj aliaj asocioj, kiel skatuloj, junulargastejanoj, sindikatoj, turistaj amatoraj grupoj, inter instruistoj ktp. ktp. Ni propagandu skribe kaj buŝe. Estas ja necese al ili montri materialajn kaj moralajn avantaĝojn. Ni devas persone inviti tiujn asociojn diskonigi la kursojn inter sia membraro. Atentigi ilin, ke per Esperanto ili povos interrilati kun iliaj samfakuloj, en la vasta mondo, atingante tiamaniere valorajn kaj precizajn informojn pri ĉio, kio ilin koncernas. Kompreneble, la propagandan vesperon, pli ĝuste la prelegon faru iu aliloka aŭ eĉ eksterlanda samideano sub prezido de iu loka eminentulo ne-esperantisto. Ne necesas ankaŭ aldoni, ke tiujn prelegojn ni devus diskonigi pere de afiŝoj, flugfolioj kaj loka gazetaro.

Por povi efike prepari tian propagandon, estus necese, ke en ĉiu E. asocio, formiĝu speciala propaganda komisiono, kiu estus respondeca pri la aranĝo, komisiono, kiu per sia programa kaj seninterrompa agado subtenus konstante la intereson de ne-esperantista publiko.

La gazetartikoloj, devus enhavi la sciigojn pri ĉiam novaj okazintaĵoj en E.-movado kaj la efiko de nia lingvo. Estas ja sciata, ke ĉiuj novaĵoj kiujn ni legas en E.-gazetaro, ne povas atingi la ne-esperantiston. Same la libro la plej interesa ne estos legata de publiko, se oni ne anoncos pri ĝi en la gazetaro. Ni jam scias, ke mirakloj ne okazas, same Esperanto ne estos adoptita de la mondo, se ni mem ne batalos por ke ĝi venku.

Nia devo estas kunigi niajn fortojn, ĝis nun nur neracie flankenigatajn, kaj ni starigu vojmontrilon, por ke neniu erarvagu.

La kolektado de subskriboj por UNO devas kontinui kaj oni devas ilin energie kolekti. Nur milionoj da subskriboj efikos. Bedaŭrinde apartaj E.-grupoj, ne komprenas ĝuste la neceson de kunagado kun la Landa Asocio, kaj ĉiu agas laŭ sia bontrovo, kaj tio ne donas realajn rezultatojn.

Landa asocio devas zorgi por povi ĉiam sendi necesan kvanton de propagandiloj al siaj E-sekcioj, progandajn broŝurojn lernolibrojn, kaj ĉerpi el ili monrimedojn. Landa asocio, devas kunhelpi en la aranĝo de propagandvesperoj kaj prelegoj. Ĝi disponu taŭgan preleganton, kiu devas je ĉiu alvoko esti preta alveni. La novfondigintaj grupoj aŭ malfortaj povus esti tiamaniere subtenataj ankaŭ per konsiloj por ne vegeti aŭ morti, kiel ofte okazas, se la Landa Asocio ne estas sufiĉe energie gvidata.

(daŭrigo paĝo 105)

# RAPIDA SKIZO PRI FRANCA EKVATORA AFRIKO

En TCHAD-regiono, negrulinoj posedas plataj-lipojn. La plataĵo estas farita el platego eltranĉita en maldika ligno, kiun ĉirkaŭas la fendita lipo. Ili laŭvole formetas ĝin, sed tiam la lipo malagrable pendas. Ekzistas ankaŭ aliaj ornamadoj. Mi vidis ekzemple orelglobojn same dikajn kiel baloneto de « ping-pong », sur kies glata surfaco estis reliefaj skulptaĵoj. Ĉe viroj estas oftegaj vizagaj strekvundoj, ili estas tre malofte videblaj ĉe virinoj. La diversaj idiomoj en la Franca Ekvatora Afriko devenas el Bantu-a lingvo, parolata en duonsuda parto de Afriko, la zulu lingvo estas kompreneble tute malsama.

En Ekvatora Afriko, la ĉefa lingvo, kiu estas derivata el la bantua, estas tie uzata kiel « afrika Esperanto ». En anglaj kolonioj, (mi tion konstatis en Kamerun kaj Niĝerio) indiĝenoj de malsamaj lingvoj parolas « Pidĝin ». Mi ofte demandis min mem, kiam « civilizuloj » imitos la « sovaĝulojn » en tiu matiero, kaj ne nur per imitado de apudborda « vestaĵo » montrante sin preskaŭ duon-nudaj.

Sude de FEA oni manĝas odoraĉan maniokon. Norde ili preferas milion: Maizo kaj arakidoj ankaŭ kreskas norde. Por planti aŭ semi milion, maizon aŭ arakidon la negrulo ne kliniĝas, ĉar kiam komencas la pluvsezono (vintro) ili fosas inter du ekpluvegoj, trueton por grajno, per plugilo je longa tenilo. Tio permesas al semanto resti staranta dum laboro.

Por rikolti arakidon indiĝeno sidas, milio kaj maizo kreskas ĝis homa alteco ; konsekvence negro neniam laciĝas.

En urboj, la komercistoj ne estas pagataj ĉiufoje por vendita komercaĵo, samo okazas en kafejoj, restoracioj kaj viandmagazenoj, ili tute simple listigas la aĉetitaj varoj sur eta slipeto, kaj la aĉetanto... pagas unufoje je la monatfino. En tiu lando estus tro laciĝe ĉiufoje eltiri la monujon el la poŝo...

Le telegrafaj fostoĵoj beligas la pejzaĝon de Ekvatora Afriko, ili konsistas el detranĉitaj arbaj trunkoj el kiuj elsprucas verdaj folioj, krome ili ne ĉiam estas plantitaj en rekta linio. Tiuj fostoĵoj konvulsie skuigiĝas laŭlonge de vojoj. En la hejmo la plankoj estas cimentitaj, sed sur stanĝetoj surportantajn kontraŭ-moskito-voalojn, mi vidis verdajn foliojn. Estas kurioze, ke telefonabonantoj pagas unufoje en la jaro la abonkotizon, (por ĉiu de aparato kaj konversacioj) sen diferenco, ĉu oni ofte aŭ malofte utiligas sian telefonon. kiam hazarde oni deziras telefoni en kafejo aŭ restauracio, oni pagas nenion, sed simple dankas por la komplezo... En Brazzaville, ĉiu loĝanto pagas aŭtobus-imposton poĵare, konsekvence utiligas tiun veturilon senpage, ĉar ne ekzistas kontrolistoj en aŭtobusoj, nek biletoj. Tiun imposton devas pagi ĉiu loĝanto, kiel mi supre diris, sendiference ĉu li utiligas aŭtobuson aŭ ne, ĉu li posedas sian aŭtomobilon aŭ biciklon. Kompreneble turistoj ŝategas tian aranĝon.

Kiam mi loĝis en IMPFONDO (en tiu tempo alvenis Ekvatoran Afrikon la grupo de esploristoj, pri kiuj skribis mia redaktorino en 2-3-a numero de AR) mi ofte aŭdis pri pigmeoj. Temis pri Babinga tribo. La Babingoj loĝas ion proksime de EPENA norden, je centoj da kilometroj de IMPFONDO.

Tiu ĉi Urbo troviĝas je la dekstra bordo de Oubangui-rivero (Ubangi) Pri pigmeoj mi nur aŭdis, ĉar ilin vidi estas tute alia afero.

En la tuta regiono nur unu blankulo el EPENA povas ilin proksimiĝi, kaj la Babinganoj ne forkuras de li. Ili konsideras lin kvazaŭ fraton. Estas li kiu helpis al la esploristoj. Se la anoj de tiu ekspedicio mem fotografis kaj registris fonografdiskojn pri tiu tribo, tio ja estas oka miraklo. Generale oni filmigas sovaĝajn bestojn per aŭtomataj fotoaparatoj postenigitaj tie-ĉi kaj tie. Ili « laboras kiel negro ». Tiuj etuloj nutras sin per radikoj, fruktoj kaj bestoj

(daŭrigo paĝo 106)

# RECENZOJ

(Ni recenzas duoble ricevitajn librojn kaj esperantaĵojn, unuoble ricevitajn, ni nur mencias).

**ESPERANTA KRESTOMATIO.** Eldonis Nederlanda Centra Komitato Esperantista. Kompilis H. A. Hoog Mr. A. J. Kalma, W. F. Kruit kaj Frato Wigbertus van Zoon. Kartonita 119 paĝa.

La supre nomita Komitato eldonis tiun Krestomation por kandidatoj al elementa ekzameno por anstataŭi la « Fundamentan Krestomation » de Zamenhof, kiun la citita Komitato konsideras kiel eltenantan « dubindajn formojn ». La libreto enhavas taŭgan materialon, konsistantan el prozaĵoj kaj kelkaj originalaj poemoj de Majstro. Baghy, Devjatnin kaj Grabowski. Ĝi taŭgas ankaŭ por aliaj esperantistoj pro zorge elektita materialo.

CK.

**LERNU ESPERANTON.** Eldonis Quarello & Cia, Buenos Aires. 31. p. Prezo 5 int. poŝt. respondkuponoj. Havebla ĉe nia libro-servo.

Tiu libreto estas eltiraĵo el la ampleksa verko « LERNU ESPERANTON », kiu ne estas ankoraŭ eldonita kaj destinita por tiuj, kiuj volas el lerni bone la lingvon. Kompreneble ĝi taŭgas bone por hispanlingvanoj, pro klarigoj superfluaĵoj por alilingvuloj

**KALENDARO 1948,** eldonis 21-a S.A. T.-KONGRESO, kiel propagandilon. Havebla ĉe: B. Bullemeyer, Jan, van Galehstraat 86 I, Amsterdam W. Nederlando por 1 int. respondkupono.

**SVEDA LABORISTA MOVADO.** Tage Lindbom, trad. M. Johansson. Eldonis Sveda Laborista E.-Asocio. Stockholm. Prezo 2 internaciaj respondkuponoj. Enhavas 92 paĝoj.

**KIU ESTAS KIU INTER NORD-AMERIKAJ ESPERANTISTOJ ?** Eldonita de Postnikov. U.S.A. Dua-eldono. 96 paĝa ; enhavas informojn kun adresoj pri esperantistoj en Norda Ameriko. Prezo 1 dblaro, Havebla ĉe A. R.-libroservo.

**FILMO pri JAVO.** Eldonis Esperanto Film-Grupo. Bergen op Zoom, Nederlando. La Grupo intencas eldoni pluajn film-striojn pri diversaj temoj kun klarigiloj por grupkunvenoj,

kies unua filmo portas supran nomon. Pri prezoj kaj aliaj klarigoj turnu vin al tiu Grupo, kies adreso estas Antwerpsestraat 45.

**FEUILLETS ENCYCLOPEDIQUES de DOCUMENTATION ESPERANTISTE** N° 3-a, eldonas Pierre Perret, LYON, 106, Cours Henri, Francujo.

Jen aperis 3-a kajero de tiu bonega verko, kiu alportos senegalan helpon al propandistoj en landoj de franca lingvo. Estas metoda kompilo de plej diversaj tekstoj, opinioj de famuloj, kiun kompletigas bonegaj fotoj, je tre diversaj temoj kaj okazaĵoj en la esperantista mondo.

Estas vere giganta laboro, kiun entreprenis tiu fervora samideano, kiu vere meritas helpon de ĉiuj. Ni esperas, ke ĉiu samideano fariĝos abonanto de tiu Enciklopedio por sia profito en la propagando de nia kara lingvo kaj por helpi la eldoniston en lia peniga kaj honorinda laboro. if.

**LA PRAHISTORIA ARTO** Agostinho da Silva, elportugaligis J. de Freitas Martins ; eldonis Portugala Eldona Rondo. Estas la kvara libreto de la jam anoncita serio en nia 9 N° 1947, kiu estas tiom rekomendinda, kiel ĉiuj antaŭaj verketoj. Prezo 9 p. ang. havebla ĉe nia libro-servo.

**LA BUDHISMO** de A. da Silva. 23 paĝa. Kontrolita de La Literatura Komitato Prezo 9. ang. p. havebla ĉe A. R. libro-servo.

**LA UNUA VOJAGO CIRKAŬ LA MONDO.** aŭtoro Agostinho da Silva. 24-paĝa. En verketo ni trovas priskribon de la unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo farita de F. de Magalhaes en jaro 1520. Kiel ĉiuj libretoj de tiu serio, ankaŭ tiu ĉi estas zorge presita kaj enhavas bonegan stilon. if.

**TRI MAJSTRONOVELOJ.** Elgermanigis E. Pebe. Eldonejo : « Tramon-do », Vieno. Prezo : ŝil. aŭstriaĵ : 5.50.32 paĝa, broŝurita. Enhavas tri novelojn de Heinrich von Kleist, Teodor Storm kaj Adalbert Stifter. Kaŭze de laŭvorta traduko, la stilo ne estas facila kaj la libreto enhavas multajn eraretojn. Ni esperas, ke sek-  
(daŭrigo paĝo 105)

# NI DISTRU NIN !

## III. ENIGMOKONKURSO

Partopreni povas ĉiu, kiu atingos 30 poentojn. Aliaj, kiuj ne atingis dum tiu konkurso supre cititan nombron, povas partopreni en la sekvan ta konkurso kaj la akiritaj poentoj estos alkalkulitaj al nove atingitaj.

Ni fiksj 3 libro-premioj por la 3 unuaj gajnintoj.


**SOLVO DE ENIGMO N° 5.** Domo, doto, koto, kato, rato, pato, poto, pomo, homo.

**SOLVO DE ENIGMO N° 6.** Du trik-var-vendistoj.

## REZULTATO DE LA KONKURSO

1-a premio S-ro P. Brunet, Valenciennes. — 2-a premio S-ro M. Delgado Austrey. — 3-a premio : S-ro A. Menou, Montpellier (Hlt). Al ĉiuj tri gajnintoj, ni samtempe forsendis la premiojn kun niaj sinceraj gratuloj.

## 3 ENIGMO



d, e, e, i, i, i, i, l, m,  
n, n, n, o, o, o, o, o, o,  
r, r,

La vortoj en horizontalaĵ kaj vertikalaĵ kampoj havas signifon : 1. diablo, 2. verbo, 3. subtero, 4. metalo, 5. pronomo, 6. litero.

4. Problemo.

De Sallauminés al Lille estas 36 kilometroj.

S. Lille.

Petro k. hundo Paŭlo

Iun dimanĉon matene, je la 6-a, Petro foriras piede S. por Lille, du-

me je sama horo, Paŭlo foriras el Lille por atingi Sallauminés, ankaŭ piede. La du viroj marŝas po 5 km. pohore, sed Petro ne estas sola, li estas akompanata de sia hundo.

Tuj de la ekiro la hundo kuras, po 20 km. por hore, je la renkonto de Paŭlo. Kiam ĝi atingas Paŭlon, ĝi revenas al sia mastro, kaj poste denove kuras al Paŭlo ; ktp... Meze de la vojo ambaŭ viroj renkontiĝas, kaj foriras ĉiu al sia celo, dume la hundo ĉiam kuras de unu al la alia. Kiam Petro atingis Lille, Paŭlo alvenis Sallauminés'on, tie la promenado finis por ambaŭ amikoj kaj por la hundo **KIOM DA KILOMETROJN TRAKURIS LA HUNDO ?**

Por la 3a enigmo ni kalkulas poentojn kaj 4 por la 4. Enigmo.

La **SOLVOJN SENDU** post la ricevo de tiu numero.

**SOLVO** de Enigmo N° 1 de III-a Enigmo-Konkurso 1. Balai. 2. Animo 3. Linio. 4. Amiko.

**SOLVO** de la enigmo N° 2. Meblisto. Komercisto. 3. Keĥnero.

**STATO DE LA III KONKURSO.** Posedas 9 poentaj S-roj : C. D. Andersen, el Gjentofte (Danujo) : P. Brunet, el Valenciennes ; A. Menou el Montpellier ; S-ro Navez el Saint-Amand-les-Eaux ; f-ino Leal, Casa. blanca, Sorel, Parizo Posedas 6 poentoj s-ro G. Meson, S. Suiza, Y. Martin, S. Etienne kaj LuBi Posedas 3 poentoj : S-roj Di Lorenzo, Perez, Barsac, Davis, Garcia, Bahl, Horak, Smetima, Den Ploeg, kaj Menier.

## LISTO de SUBTENANTOJ

« por ke A.R. vivu kaj kresku »

S-ro Knecht, Ft. Archambault	500 —
S-ro Ananimulo, Meknes	200 —
S-ro Ohana, Marrakech	200 —
F-ino Leal, Casablanca	100 —
S-ro Bardot, Paris	28 —
S-ro Ernest M. Fez	250 —
F-ino Claudia Tissot, St-Etienne.	107.20
S-to Tuffler	80 —

## RADIO

WIEN. Ekde la 7-a de oktobro 1947, refunkcias E.-servo, ĉiu mardon de 18.20 ĝis 18.30 per sendilo II 31 m. 41 m. kaj 228. 6 m kaj merkredon

(daŭrigo de 103 paĝo).

matene de 6.35 - 6.45 per sendilo 1., 506. 8 m. Esp. dissendoj por eksterlando okazas, marde vespere de 18.25-18.30, dum aliaj tempoj estas germanlingvaj dissendoj pri Esperanto.

Cekoslovakujo. *Ciutage* 1. de 16.30-16.45 GT per 49.92 m-6010 kc kaj 2. de 22.00-22.15 GT. per 49.92 m-6010 kc. LUNDE kaj JAUDE de 21.50-22.00 per 470 m.

VERDA STACIO PRAHA ĉiun unuan lundon en la monato (ekde la 5.1. 1948) de la 22-22.30 GT per 270 m kaj 325 m.

Aŭskultu lin kaj informu pri tio skribante al ESPERANTO-SERVO de RADIOSTACIO Praha XII. Stalino-va 12.

FRANCUJO. *Ciutage* ekde 15-a de decembro 1947 sur 41 m. 21, dum unu kvaron-horo, de 18.15-18.30 (laŭ franca horo) aŭ de 17h15-17.30 (laŭ Greenwich).

Tiuj skribu al « Radiodiffusion Française. Emissions espérantistes vers l'étranger, 110, Champs Elysées, Paris 8° por danki gratuli. Skribu en Esperanto.

vanlaj eldonadoj estos pli zorge tradukitaj kaj bone kontrolitaj antaŭ la « meto sub la preso ».

DU AMOSENTAJ NOVELOJ : Imenlago : aŭtoro T. Storm kaj Maruška de M. Escherich. Tradukanto Alfred Baden. 41-paĝa, eldonis Svisa Esperanto-Societo. Prezo 2.05 sv. fr. havebla ĉe nia libro-servo.

La rakonto estas tro melankolia kaj ne lute konkordas kun nuna vivo-fluo. La dua rakonto troviĝanta en la verkaĵo, estas ankaŭ pri-ama rakonto.

Stilo estas ĝenerale bona, libro remendinda. SO. KO.

ĈE LA SANKTAJ AKVOJ. Aŭtoro J. C. Heer. Eldonis Svisa Esperanto-Societo. Unua parto. Tradukanto A. Bader, P. Le Brun kaj J. Schmid. Unua parto enhavas 8 ĉapitrojn, 81 paĝojn prezo 3.05 sv. fr. havebla ĉe A. R. — libro-servo.

La libro priskribas la vivon en svisaj Alpoj kaj pri ilia popolo kaj moroj de tiu. kaj ĉiujn flankojn de ĝia karaktero. ĉio en la formo de romano.

Same kiel « Du Amosentaj Noveloj » tiu libro estas bonstila kaj certe plaĉos al esperantista leganto, kiu devus havigi al si tiun verketon, tre bele eldonitan sur bona papero kaj gramatike senripoĉa. if

### (DAURIGO EL 101 PAGO)

Laŭ prilaborita programo de propaganda komisiono de L. A. lokaj sekcioj aktive povus kunlabori. Kaj jen la grava punkto, ke oni dividu la taskojn inter la plejagaj samideanoj. Estas necese, ke ĉiu agemuĉo aliĝu al iu ajn ne-esperantista asocio, kaj tie jam kiel plejrajtaj membroj, propagandu Esperanton. Komence kompreneble singarde, despli la rezultato estos certa. Tio ja estas unu el eroj de la programo de propagando. Nura vizito de E.-grupo, kie ĝenerale oni ne parolas Esperanton ne sufiĉas. Kaj kio koncernas la lingvon nacian, ĝi devas esti konsiderata en la E.-klubejo kiel fremda lingvo, kiun oni ne devas paroli. Samideanoj, devas aŭdi en sia grupo nur Esperanton.

Estas grave, ke oni pendigu elmontroketeton, en la loko la plej konata en la urbo, en kiu troviĝus adreso de la asocio, kun ekzaktaj horoj de grupkunvenoj. Se tia kesteto estus tro multekosta por neriĉaj E.-grupoj, ke oni petu la permeson pendigi kadrojn en stacidomoj, kafejoj, en kuracistaj atendejoj, en tramoj ktp. ktp. konsekvence, ĉie, kien venas, multaj personoj. Kompreneble, estas necesege, ĉiam porti E.-insignon, do ne nur kiam oni iras al E.-grupo. Tio estas multefika propagandilo. Kunlaboru en la gazetara servo, verkante taŭgajn nelongajn artikoletojn. Same sciigojn de ĝenerala graveco, ricevitaĵojn de eksterlandaj samideanoj, traduku, transdonu al loka redakcio, kun mencio « pere de Esperanto ». Ĉiam kunportu iun kvanton da propagandiloj en vialanda lingvo, por povi tiuj subteni vian buŝan propagandon. Se vi ne posedas multe da propagand-broŝuroj, pruntu ilin al viaj ne-esperantistaj amikoj. Grava estas ankaŭ Ekspozicio. La materialon, devas prokuri Landa asocio, kiu laŭvice pruntedonos al siaj sekcioj.

Se ĉiuj agu laŭ supraj konsiloj, nia lingvo venkus de post longa tempo.

La Red.

(Sekvo de 102 paĝo)

La Babingoj loĝas en praarbaro. Ilia vivo similas pli al tiu de simio ol homo. Ili estas tre sovaĝaj, aktivaj kaj laboremaj, pri ili oni vere povas diri, ke ili « laboras kiel negro ». Tiuj etuloj nutras sin per radikoj, fruktoj kaj bestoj de arbarego. La grandstaturaj negroj sklavigis ilin, ĉar pigmeoj estas ankoraŭ pli simplaj ol negroj. Tutan semajnon pigmeo laboregas por unu sola plenumo da salo, aŭ por kelkaj cigaredoj. Pigmeo ne miras, se por elefanta dento li ricevas nur du, tri cigaredojn. Sed oni konstatis, ke tiuj moroj iom post iom malaperas.

Babingoj estas tre lertaj en la fabrikado kaj uzado de siaj malgrandetaĵoj. Per hakilo, kiel tranĉrando estas nur kvin-centimetrojn longa, ili dehakas rapide « fromagarbon », kiu estas kvardek metrojn alta kaj ses m. ronda. Per siaj etaj lancoj kaj sagoj ili mortigas la plej grandajn bestojn. Oni eĉ asertas, ke pigmeo faligas sin el arbo sur elefanton kaj mortigas ĝin rajdante la bestegon.

Oni ne sufiĉe konas tiun malaperantan popolon. Kaj ofte oni demandas sin ĉu civilizati ilin aŭ lasi je ilia sorto. Mi persone estas inklinata por la dua solvo, ĉar pro ilia malalteco kaj nesufiĉe disvolvita cerbo, ili estos ĉiam ekspluatataj de normalakreskuloj kaj pririditaj. Kaj tio estas akra kaj daŭra torturo eĉ por bestoj.

Fernand KNECHT.

Ni pardonpetas niajn karajn abonantojn pro malfrua forsendo de tiu numero. La kaŭzo estas, ke ni ekscias, ke la pakajo enhavanta tiun numeron estis detruita, dum la fama-striko en Francujo je iu poŝtoŝtupo do ni devis represi ĝin (kompreneble kun reduktita enhavo pro gravaj elspezoj) kaj esperas, ke depost januaro, kun helpo de niaj karaj abonantoj, la gazeto aperos tiom regule, kiom permesos al ni niaj financoj.

Multe da abonantoj revuo aperos ĉiumonate. Ĉar ni bezonas 100 novajn abonantojn ĉiumonate, por eldoni la kajeron.

**GRAVA !**

Bv. noti novan adreson de nia redakcio **AFRIKA REVUO**, 54, Rue de l'Aviation Française, CASABLANCA, Maroko.

**LA REDAKCIO DE A. R.** koreĝe dankas por ĉiuj bondeziroj al siaj fidelaj amikoj kaj abonantoj, kiujn ĝi reciprokas sincere, dezirante al ĉiuj legantoj, feliĉan kaj prosperan, **NOVJARON**.

**ACETU LIBROJN ĈE NIA LIBRO-SERVO.**

**PAG-MANIERO.**

La abonkotizo por unu jaro 7 ang. ŝil. aŭ egalvaloro en vialandaj valutoj. La monon sendu je la nomo de nia ĉef-redaktoro. Francaj s-anoj, kiuj posedas poŝtĉekkonton, pagu je la poŝtĉekkonto N° 111.75 en Rabat (Fink). El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, nek respond-kuponojn, pagu al ĉef-delegito de U.E.A. en via lando (vidu la pag-tabelon kun iliaj adresoj en 3 N° de A.R. 30 paĝo). Unu ŝil valoras 44 = fr.fr.

**LIBRO SERVO de A. R.**

Konsultu niajn libro-listojn en N° 10 kaj nuna numero.

**GRAVA NOTO.**

Plialtigo de preskostoj por nia revuo kaj plialtigo de poŝtelspezoj por ĝia ekspedi, ekspozas je danĝero la ekziston de nia revuo. Se vi volas nin helpi pagu tuj vian jarabonon por 1948, fariĝu subtenanto de via revuo (duobla jarabono) aŭ patrono de ĝi, (dekobla jarabono).

Mendu ĉe nia libro-servo, *ĉiujn librojn*, kiujn vi bezonas ni ekspedas la menditajn librojn, tagon de la alveno de via mendo.

Ni publikigos regule la nomojn de niaj mecenatoj sur la kolonoj de nia revuo.

Niaj abonantoj, kiuj ne plu deziras ricevi nian revuon, sciigu nin pri tio per simpla poŝtkarto. Por ne interrompi la ekspedadon de A.R. ĉiu abonanto, kiu ankoraŭ ne pagis 1948 abonkotizon, kaj kiu restas fidela al nia revuo, sciigu nin pri via pago, farita al niaj perantoj, samtempe kun la sendo de mono al ili.

## KORESPONDU !

Publikigo de anonceto pri korespondo kostas 3 internaciaj poŝtaj respondkuponoj. por linia anonceto ; ĉiu plia linio 1 int. respondkupono. POR ABONANTOJ LA PUBLIKIGO DE ANONCETO PRI KORESPONDO, ne pli granda ol du-linia estas senpaga.

MALLONGIGOJ. Dez. : deziras f.-ino fraŭlino ; S-ino sinjorino S-ro : sinjoro ; D-ro : Doktoro ; prof. : profesoro interŝ. : interŝanĝas ; kĉl. : kun ĉiuj landoj ; pĉt. : pri ĉiuj temoj ; PI. poŝtkartoj ilustritaj ; L. letero ; PM. poŝtmarkoj ; s-ano samideano ; k. Af. kun afrikanoj ; kor. korespondi ; gaz. : gazetoj fot. fotografaj ; bfl. bildflanke. uz. uzitajn ; neuz. neuzitajn ; p. : pri ; lin. lingvoj ler. lern. hb. libroj.

GRAVA NOTO. Skribante al iu el subaj adresoj, NE FORĜESU MENCII al via korespondanto, ke lian adreson ; vi trovis en A.R.

ANGLUJO S-ro M. Delgado « Andaluĉia », Austren Nr. Nuneaton, Warwicks, dez. kor. pĉt. kĉl. kaj interŝ. P.M.

2. S-ro R. G. Richardson, BM/Gran London, W. C., 1 dez. kor. angle kun knaba amiko ĉiuaga kĉl. sendu foton.

ARGENTINO. Interŝ. uzitajn PM. kaj neuz. kĉl. Luis Vicino, Maza 1448-50 + Suc. 23 + R. 7. BUENOS-AIRES.

BELGUJO. S-ro L. V. d. Briele, 18 r. Verte-Boezinge (Fl. Qcc.) dez. kor. p. lin. kĉl. Dez. ler. araban kaj kor. kun islamano pri lia religio. Dez. amikan kor. kun f-inoj ĉl. Dez. interŝ. PI. PM. gaz. lib. landkartojn, kaj kor. p. literaturo. Ĉiam respondas.

BULGARUJO. Komercisto dez. interŝ. de PM. kaj kor. k. komercistoj de artbildoj, industriistoj, eksportistoj kaj komercistoj, kiuj havas intereson pri bulgara bazaro en la estonteco.

2. S-ro Ivan Dimov, v. Glavaci-Vraĉansko, dez. kor. k. Af. Serĉas kor. por siaj ŝamgrupanoj, gekursanoj kaj 10-13-jaraj gelernantoj.

ĈEKOSLOVAKUJO. 1. S-ro Zdenek Dacic, ZLIN 2, Prumyslove koleje, 2700/507 dez. kor. k. knabinoj.

2. S-ro Hutar Jaroslav, Benešova 31, BRATISLAVA, serĉas kor. en Maroko.

3. Esp. ĝardenistoj (amatoroj kaj profesuloj) turnu vin al s-ro L. Kyncl flor-komercisto Kvetinova-sin, PRAHA VIII, Palmovka.

4. S-ro S. Pytloun, Kraslice, Francouzska 720, dez. interŝ. kompletajn seriojn, kaj kor. france se eble kun skoltestro.

5. S-ro Toman Vit, kontroloro ĉe f-ko

Bata, Sezimovo Usti dez. kor. kaj interŝ. PM. kaj papiliojn.

DANUJO. S-ro Chr. Jensen, Maagevej 4 Odense, dez. kor. kĉl. interŝ. PI. PM. sendu 100 PM kontraŭ 100 danaj.

FRANCUJO. S-ro Pierre Bouquerel, 74 Rue Verdun Bagnex, Seine PARIS interŝ. PM. kĉl. Ĉiam respondas.

2. S-ro Romain Chambaz, 44 rue du Haut-Pavé, ETAMPES, (S.-et-O.) kontraŭ bele filatele afrankitaj PI. kaj kovertoj, ne pre sammaniere respondos.

3. S-ro Joseph Prouza, La Chartonniere, Villefranche-sur-Saône, Rhône, dez. interŝ. PM. kĉl. Ĉiam respondas. Li donas interŝanĝe PM. de Fr. Monaco. kaj fr. kol. Kor. Fr. Esp. ang. ĝer. rusè, kaj itale.

ITALUJO. Knabo Moretto Antonio, Azzano X (Udine) dez. kor. kun knabo kaj interŝ. PM. Estas naŭjara.

AUSTRUJO. S-ro Fr. Weisskirchner, EBENSEE ; Marktgasse 1, dentisto, dez. interŝ. bildkartojn kaj PM, k. 1.

HUNGARUJO. S-ro Johano Valastyan Bekasesaba, V. Szepesi u. 5 dez. kor.

NEDERLANDO. S-ro Wim Derks, Leeneren STR. 24 TILBURG, dez. kor. p. L. kun Af. knabino. Estas 24-jara studento.

NORVEGUJO. S-ro Fridolf Lindholm, Munchs gt. 5, v 624 OSLO dez. kor.

POLUJO. S-ro E. Turek. Pabianice, Ks. P. Skargi 39, 18-jara studento, dez. kor. kun 17-18 jara s-ano aŭ s-ino.

SVEDUJO. S-ro Gothe KARLSSON, Sotra, Linsjon, dez. kor. kĉl. interŝ. PI. gaz. PM ktp. Responde garantiata.

2. S-ro Sven. Stoltz, Box 3022, LEKSANDER dez. kor. k. interŝ. PI. kun ekster-eŭropanoj, Garantias la respondon.

### EDZIGO.

En HENIN LIETARD Francujo. Edziĝis 3-an de januaro S-ano L. Bourgeois kun f-ino Sofhie Maillot, ambaŭ membroj de Henina Grupo ». S-ro Laborde malnova esperantisto kaj vic-urbestro unuigis tiun verdan paron en la urbdomo de tiu urbo. Korajn bondezirojn kaj multajn esperantistojn deziras la Redakcio de Afrika Revuo.

BONVOLU KOREKTI SEKVANTAJSERAROjn, kiujn ni rimarkis en 9-a No pago 98 en Popolaj Divenitaĵoj.

Devas esti : Armeon (ne aemron)

" patrinon (na pEtrinion).

Jen la solvoj de A. P. D.

1. Luno kaj suno

2. La nubo

3. Moneroj

4. La bovo

5. Lakto

6. Kolharoj de ĉevalo

7. Piedoj, oreloj, vosto

8. Testudo

9. Kokoj.

(Sekvo de 82 paĝo)	S p.	Ce la sanktaj akvoj : Hëer	
Svisa Antologio, bind.	26.6	(Petu prezajn por libroj, kiu ujn vi ne trovis en nia libro-listo).	
Synnove Solbakken : Björnsen	2.0	TRI MAJSTRONOVELOJ : Pebc	
Teatra korbo : Baghy	1.6	Colomba	1.6
Tejo kaj cerik : Toms, legolibro	1.6	Ŝep vangofrapoj	3.0
Tri Angloj Alilande : Merchant	1.0	La Virineto en bluo	3.0
Tri Rapsodioj : Szilagyi	3.6	La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo	9
Tri Homoj en Boato : Jerome, bind.	10.6	Arboj de la arbaro kaj kampo	1.9
La Trovita Felico : Sekelj	8	Rusaj noveloj	9
Undino : Schneider, bind.	5.0	De muheddin gis mundilatin	9
Vagabondo kaj Sinjorino, bind	7.0	El klasika periodo de esperanto	9
Verdaj Donkiŝotoj : Baghy, bind	7.6	La kongresaj paroladoj de Zamenhof	9
Verkaro de Fez : Wiesenfeld	11.6	La kongresaj paroladoj de Z. II. parto	9
Victoria : Hamsun	2.6	La avo	9
La Vidvineto : Allencar	1.6	La jurnaskito	9
Veterano : Bragga	2.6	La jubilea kongreso de E. 1912	9
Vivo de Zela : de Silva	2.9	La ora Kongreso de E. 1937	9
Vivo vokas : Engholm bind.	9.0	Nordnordaj fabeloj	9
La Vojo Returne : Remarque bind.	5.0	En la vagono kaj aliaj rakontoj	9
Ano de Toofjuuroo : Kikuĉi	2.6	Rozinjo	9
Antonio kaj Kleopatro : Sekspir	2.6	El la londona skizlibro	9
La Botistoj : Kivi	1.3	Flugado alimonden	9
Dekdu poetoj : Kolocsay bind.	6.9	Patro kaj filo kaj aliaj rakontoj	9
Dialogoj kaj komedietoj : Dahl	1.0	Novaj esperanto historietoj	
Deverskolora bukcedeto : Lorenz, broŝ. bind.	1.9	La neevenkebla Ceno, Thijssen.	11.0
Eterna sopiro : Olŝvanger	1.6		
La Fianĉigo : Leo Kivi	6	<b>Bv. noti kondiĉojn de nia libro-servo.</b>	
Miniaturetoj : Nash, bind.	1.0	Kun la mendo bv. sendi koncernan monon. Oni povas pagi per mono de koncerna lando sendebila en letero ; per internaciaj poŝtaj respondkuponoj, stampitaj maldekstre de via poŝtoŝeĉejo kaj je nia poŝtĉekkonto N <sup>o</sup> 111.75 Rabat (je nomo de nia ĉef-redaktorino s-ino Fink) francaj samideanoj, kiuj mem posedas poŝtĉekkonton, povas utiligi tiun pagmanieron, aliaj per poŝtmandato. El landoj el kiuj oni ne povas sendi monon, nek respondkuponoj, pagu al ĉef-delegito de U.E.A. en via lando (tabelo kun adresoj en 2-3 N <sup>o</sup> j de A.R. 30 paĝo).	
Rimportretoj : Kolocsay	2.6	Aldonu 10 % por sendkostoj. Por la mendoj, kiuj superas 2.000 fr. fr. ni ne kalkulas la sendkostojn.	
Romeo kaj Julieto : Sekspir	2.6	Ni rezervas la rajton ŝanĝi prezajn sen antaŭa avizo - pro la ŝanĝitaj kursoj.	
Spegulo homarana : Erkkö	1.2	Pro ofte ŝanĝataj kursoj, ni donas la prezajn laŭ angla monsisistemo : 1 ŝilingo : 12 pencoj, 20 ŝilingoj : unu funto : 863.80 fr. fr.	
Sakludado : Giacosa	1.0		
La tragedio de l'Homme : Madach	9.0		
Bhagavad-Gitā : Lorenz bind.	2.0		
La biblio	8.6		
Historio de kristo : Papini broŝ. bind.	12.2		
Islamo esperantiste rigardata	15.		
Vivo de nia sinjoro jezuo : Dickens luksa bind.	9		
De tutmonda perforto al tutmonda frateco bind.	6.0		
La fino : Bernadote	3.6		
La juda ŝtato : erzl	5.3		
Progresado kaj la, pasinteco	5.0		
Australio-Lando kaj popolo	3.6		
Tra sovaĝa kamĉatko : Bergman	5.6		
Vivo de eskimoj : da Silva	8.9		
Arthistorio : Kolocsay	7		
Homaj rasoj de la mondo	16.6		
Pri bredado de abeloj : Andersen	5.3		
Pri moderna arto : Grenkamp, bind.	5.6		
La espero (kun muziknotoj)	6.0		
La vojo : Zamenhof (kun muziknotoj)	4		
Ĉu vi scias ? Appleby	2		
Murdo en la orienta ekspreso	9		
La knaboj de Paulo-Strato	L.6		
La princino kaj Betty	L.6		
La tempo-masino	L.6		
Princino de marso	L.6		
Esperanta Krestomatio			
Lernu Esperanton	1.2		
La Prahistoria Arto : da Silva			
La Budhismo : Da Siva			
La Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo			
Du amasantaj Noveloj : Storm			